

Alfred Knapp,
Printemp-vekiĝo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Leviĝis Sun',
tagiĝas nun,
la nokto iĝis for.
Sub ĉielblu'
jubilas plu
de l' birdoj vigla ĥor'.

Floreto jam
en la ornam'
de sia petalar'
malfermis sin,
ĝojigas nin
per sia rosa klar'.

Ja iĝas for
de l' kor' dolor',
se ĝin rigardas vi.
De l' Tero rond',²
la tuta mond',
belega estas ĝi!

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingserwachen" de ALFRED KNAPP (*1933-03-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-273-553 (2005-01-24 21:54:05)

²aŭ: La Tera rond',